



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 10 numeroj):

Aŭstralo: 4 ŝilingoj kaj 6 penco; Ekster Aŭstralo: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondikupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 6 penco. :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 157 (14th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

9 DECEMBRO, 1933.

VOLAPUK, AND AFTER.

It is indeed good to realise that our world is not peopled wholly by "angels who fear to tread"; because of those who dare the world moves on.

To a German parish priest, Johann Martin Schleyer, mankind owes the first decisive step forward in the march to an international language. For a few brief years his Volapuk was actually used, and, in spite of his failure, the fact remains that he took a stumbling step forward while others had merely discussed the possibility of walking. We now smile at the rude machines of Santos-Dumont and the brothers Wright, but these pioneers, we must remember, actually left the ground, and without their patient groping and courageous blundering nothing would have been achieved.

The story of Volapuk's rocket rise and fall is told fully in "A short history of the international language movement" (A. L. Guerard, London, 1922), and the now incomplete but well-written "International Language" of W. J. Clark, London, 1912, contains a pithy chapter. Esperantists will find in "Historio de la Mondolingvo" (E. Dreeen, Leipzig, 1931) a detailed critical account of the brief but colorful life of the language. The weightier

encyclopedias also give space to the matter.

Volapuk lingered till 1911, when it passed away with its inventor, aged 80. Its collapse, it is true, created a prejudice in the public mind against the idea of an international language, but this has passed. To-day one finds hard-headed business men ready to take a risk, as witness the faith of certain Continental publishing firms relative to Esperanto.

As Zamenhof, the author of Esperanto, in speaking of Volapuk, said:—"Schleyer was the true father of the international language movement; he was the first to say, 'I wish not only to dream, but also to labor for my idea.' While all around slept, he created the practical movement. Volapuk was not vanquished by Esperanto . . . it perished of itself, while Esperanto was yet too weak to vanquish anything. It perished not by reason of its strange sound or any similar cause, for one can become accustomed to anything. What today seems crude, tomorrow will appear quite natural and beautiful. By long use the idiom even of the most barbarous tribe would become a rich, elegant and fitting language. Volapuk perished chiefly on account of one

important error—an absolute lack of the power of natural evolution. For every new word or form the language had constantly to depend on the decision of one person or of a committee only too ready to dispute among themselves. As on a stick planted in the earth, new leaves and branches cannot naturally grow, but must be sculptured or glued on, so with Volapuk. Had it not been for that error, which unfortunately no one could correct, we all probably would be speaking it today. But that regrettable error, caused not by lack of talent or industry, but by a too rapid publication, without sufficient proof in practice, in no way detracts from the merit of its author, who first powerfully shook the world on behalf of our idea."

Language knows no pope; and Schleyer erred in attempting to copy-right Volapuk. Unity and continuity are essential to the development of an international language, whose normal life, like that of a nation, must be a constant compromise between the conservative and progressive elements.

Before Volapuk had flashed on the mind of Schleyer, young Lazarus Zamenhof, a Warsaw student, was planning a sounder scheme, and today

international language and Esperanto are for most of us the same thing. In Esperanto is bound up the fortune of all those who hope for the success of an auxiliary tongue. It seems certain that the system ultimately accepted will be either Esperanto or an adaptation of it.

The lesson of Volapuk was not lost on Esperanto's guides, who, realising that individual reform means death, agreed on an absolute, standard grammar and gave unswerving loyalty to a small book containing the first vocabulary of the language, its 16 grammatical rules and a few exercises. This they called the Fundamento, which is as the law and the prophets. Everything contrary to the Fundamento is not Esperanto. But is there not danger from the opposite direction? How can progress be reconciled with the inviolable authority of an infallible document? It is answered that the Fundamento, although a norm; is by no means limitative, for any person may introduce new words into the language. All words common to the major European tongues may be used with the precaution that they assume Esperanto orthography. If the new word be clear, euphonious and necessary it will spread by natural imitation and in due course be officialised by the Esperanto Academy, which at intervals issues additions to the list of official roots. It thus plays a role similar to that of the Académie Française. If two words are proposed for the same idea they fight it out. Sometimes a neologism is never recognised, and so dies; perhaps some of the older forms become obsolete. Sometimes both forms survive as more or less synonymous, and are used side by side. At no time will there be a break in the development of the language: never any arbitrary intervention. Thus one has growth—reasonable liberty reconciled with the paramount need for unity.

Esperanto owes its success primarily to its great, though not unique, qualities, partly to the wise tactics of sacrificing theoretical perfection to unity and continuity; but most of all to an exclusive virtue which many of its critics fail to comprehend—its spirit. Although only a language, and disclaiming any other purpose, it nevertheless is characterised by an "inner idea," a basic striving for human brotherhood. This is the reason why, with many, it engenders an enthusiasm

which approaches an almost religious fervor, as though it were a new evangel. It is the bond that unites its adepts, making them, as it were, a "super-nation," the embryo of the future world state. Men of all races and religions have found communion in that spirit, strong enough to give a constructed language the capacity for emotional expression equal to that of the national tongues. Esperanto, totally independent of any individual authority, with its healthy resistance to sudden change, its power of inner growth, its practical application and high idealism, presents a soundly organised service to all who will avail themselves of it. Pioneer Schleyer's brilliant failure, light-bringer to those that followed after, surely helped to this end, and its full story today makes brave reading.—R.B.

NIA POSTO.

D-ro F. W. en S. La E. alvoko adresita al ne-Esp. skoltaj ne efikus. Ni bezonas anglalingvajn por disdoni inter ilin.

S. en L. Viaj demandoj montras vin funda studento de la Zam-aj tekstoj. Fabeloj de A. Vol. 2, p. 152: "Tie aŭ alie." Malfacile estas, kredi, ke Z. tiel skribis konscie. Devas esti: Tie aŭ aliloke, aŭ eventuale kiel provo "tie aŭ alie." Ĝi povas esti ankoraŭ ekzemplo de ekstermana prituŝo, kun celo "plibonigi" aŭ "kurtigi" (mallongigi) oftan vorttrion:

"Pasaĝero" (La Rabistoj, p. 59): Uzita ŝajne en senco de piedvojaĝanto, kaj ne laŭ Kabe kaj la ceteraj vortaroj. Eble ni jam povu nomi ĝin arhaismo. Kp. vetur' vojaĝ' piedir'.

"Kiu rigardis sin kiel kompetentajn" (O.V. 386): Interesa ekzemplo de la akuzativo post "kiel," ĉar sen "kiel" la frazo havus la saman senco kun la nominativo predikate: "Kiu rigardis sin kompetentaj." Eble ni povus klarigi la du formojn jene: 1. Kiu rigardis sin kiel ili rigardus kompetentajn personojn. 2. Kiu rigardis sin esti personoj kompetentaj.

H. in Ul. The Language Committee was founded at the Boulogne Congress in 1905. Its task, according to the rules approved in 1912, is "to give care to the conservation of the principles of the language, and to supervise its evolution."

The number of Committeemen is not limited. In 1932 there were 129 mem-

bers, who represented 26 languages. The Committee elects its own members, but the national and specialist associations can recommend candidates.

From those of its members who possess special linguistic qualifications and who have the means of effectively co-operating in the work to be done, the Committee elects a higher commission, called the Language Academy. This body consists of not more than 18 members. Its president is now M: Rollet de l'Isle.

J. E. en W. Viaj rimarkoj estas iom sevrĝaj. Konfese, ke ankoraŭ sentigas certa nesistemo rilate la fak- kaj profesinomoj. Ekz., filologo, fizikisto, anomiisto. Legindaj ĉiutukoneksas estas "Fremdvortoj en Esp-o" de P. Neergaard, kaj la koncerna recenzo fare de Kalocsay en Bibliografia Revuo Nr-o 3 (eld. Lit. Mondo). Vi speciale indignigas pri "astronomo," kiu laŭ via opinio devas signifi ne homon sed astron plus nomo, do stelonomo! Sed la vorto estas grekdevena kaj signifas etimologie ne stelonomo sed leĝo pri la steloj. G. asteer—stelo; nomos—leĝo; astronomia (astronomio, stelscienco); astronomos, (astronomo, stelsciencisto). Vi devas lasi influu ankaŭ la fakton, ke pri la stelsciencisto la Hispanoj sialingve uzas astronome, kaj la Hispanoj kaj Italaj astronomo. Cetero vi rajtas uzi en E-o astronomiisto anst. astronomo.

NASKIGO.

Al Hilda (naskita Dawes), edzino de Reginald F. Banham, ŝia dua infano: Margaret Ruth. Ambaŭ bonsanaĵ.

RADIO LESSONS.

Esperanto lessons will be given from Station 3AR, Melbourne, on the dates given below. The anecdotes given at the conclusion of the lesson are given to enable beginners to check their pronunciation.

Dec. 16.—Juĝisto: "Mi rimarkas, ke vi ŝtelis ne nur cent pundojn, sed ankaŭ grandan kvanton da juveloj." Akuzato: "Jes, sinjoro; mi memoris, ke la mono sola ne alportas feliĝon."

Dec. 30.—"Kial vi rigardas min tiel, etulo?" "Ĉar panjo diras, ke vi trinkas kiel fiŝo, kaj mi deziras scii kiel fiŝo trinkas."

Heinrich Gorlich, Teplitz Schonau, a.o. Krankenhaus, Ĉeĥoslovakio, serĉas seriozajn kor. pri socialismo kaj la lab. movado ĝenerale.

N. Z. E. A. SECTION.

(13th Official Bulletin).

Activities during Concluding Quarter, 1932-33.

Although the operations of the complete year are to be fully reviewed in the annual report to be presented at the 5th New Zealand Congress to be held at Wellington from 26th to 28th December, it is perhaps expedient to include herein a brief survey of the NZEA's activities in the final quarter of the 1932-33 financial year. Such a survey will serve the useful purpose of assisting members to understand the extent and the value of the work which their national organisation is undertaking in the interests of Esperanto, and at the same time will remind them that their support is vitally necessary to the NZEA in order to ensure its smooth functioning.

Membership Matters.

Several members came forward during the quarter to increase the membership to a total of 93, which figure exceeds last year's total by 3; and 10 have already renewed for the forthcoming year. This is most satisfactory; and the increase may be taken as indication that bedrock has at last been reached, for in the preceding 12 months there had been a decrease of 13 members. May the new year bring an even greater expansion! With the membership so well maintained, it is confidently expected that when the NZEA's accounts are closed at the end of the year a small surplus will be revealed. Donations (£1/10/6) during the year enhance the prospects.

NZEA Standing Committee

met on 31st August, and the committee's decisions included the following:—(1) that the appointment of Messrs. W. L. Edmondson, F.B.E.A., Bertram Potts, F.B.E.A., and L. E. Dust, D.B.E.A., as tutors for the NZEA Correspondence Course be confirmed; (2) that the secretary obtain the biographies of well-known Dominion Esperantists; (3) that a special circular to further the NZEA's membership be issued; (4) that commencing in January, 1934, an advertisement announcing particulars of the NZEA be published in "La Suda Krucio"; and (5) that the principles of the "Interkonsento de Geneva, 1933," be supported by the NZEA, and the UEA be requested to state the mini-

mum amount for which the NZEA will be accepted as an affiliated society.

It should be stated that, in connection with (2), communications are being forwarded personally to pioneers and active Esperantists, but the biographies of persons other than those addressed will also be received with thanks; and (5) that the 5th N.Z. Congress will decide whether or not the NZEA is to affiliate with the recently re-organised international body in accordance with the conditions laid down by the UEA and which are expected to arrive in time for congress.

5th N.Z. Congress.

At writing, the preliminary arrangements are being made for the holding of the above-mentioned congress at Wellington on 26th, 27th, and 28th December. At a combined meeting of the NZEA Standing Committee and representatives of the Wellington Club held on the 10th October, a Local Congress Committee was appointed and the following skeleton programme decided upon:—26th December (Boxing Day).—2 p.m.: Formal opening; welcome to delegates, etc.; official photograph. 8 p.m.: NZEA annual general meeting. 27th December.—10.30 a.m.: UEA annual general meeting (N.Z. section). 2 p.m.: Lecturette session (both in Esperanto). 8 p.m.: Concert and social evening. 28th December.—Excursion. 8 p.m.: Supper and formal closing. (N.B.—Congress correspondence should be addressed to the NZEA secretary, whose address is shown below.)

International Co-operation.

It is always the desire of the NZEA to co-operate in this field wherever possible. From time to time the NZEA has responded to official requests appearing in "Esperanto," such as for material for exhibitions, etc., in the belief that by co-operating the movement abroad is strengthened by the tangible proof provided of the widespread establishment of Esperanto. The last request of this nature received came from Göteborg, Sweden, and was complied with. In addition, a congratulatory letter was forwarded to s-ro O. Deguti, Ajabe, Japan, leader of the Oomoto movement, on

the occasion of the 10th anniversary of the introduction of Esperanto into Oomoto; and agency work was done on behalf of "La Suda Krucio"—small but useful tasks.

Encouraging Signs; General Functions.

During the quarter enquiries for information were received from interested persons in camps at Kaiangarua, near Rotorua, and at Dargaville, North Auckland; information was also supplied to the prospective founder of a class at the Y.M.C.A., Mt. Albert, Auckland. Particulars regarding textbooks were given to several individual enquiries; and the names of several qualified Esperantists were recommended to Mr. W. J. Collins, of Christchurch, who was anxious to obtain the co-operation of an experienced Esperantist to act as a reviewer of his translated work on the Maori people. The NZEA correspondence course is being advertised in the newspapers in the four chief towns of the Dominion and numerous enquiries have been received. An outstanding feature in connection with the course is the number of communications received from editors of newspapers outside of those being utilised, requesting that advertisements be placed in their respective journals. A letter appeared in the correspondence columns of "The Dominion," Wellington, congratulating the NZEA on its initiative in introducing the Course. All hopeful and encouraging signs.

Propaganda.

Ever, an important portion of the NZEA's activities, propaganda of a varied nature has been conducted. Oversea visitors have (in accordance with a practice operating during the past 18 months) been brought into direct contact with Esperanto by means of NZEA circulars. Besides visitors from Australia, Africa, England, and America, Dante, the world-famous Danish magician, was supplied with informative literature, as was the Japanese training ship "Shintoku Maru," which spent 10 days at Auckland during September.

The official recognition and use of Esperanto by post and telegraph ad-

ministrations was outlined in a comprehensive article written for "The Katipo," Wellington, the official organ of the N.Z. P. & T. Officers' Association, an organisation with over 8,000 members. The article, which was given a prominent position in the journal, contained a plea for the edition of a series of pictorial postcards to advertise the amenities of New Zealand, each card to bear a description in Esperanto and in English.

Secretarial Request.

From time to time the NZEA receives enquiries from abroad for addresses of Esperantists in the Dominion desirous of corresponding in Esperanto, either by postcards or by letters; and to facilitate the complying with such requests it is proposed to establish a special roll of correspondents. All who are interested are requested to communicate with the secretary, and correspondence will be passed on as it arrives.

Subscriptions.

The 6th year of the NZEA's operations commences on 1st December, 1933, on which date NZEA subscriptions for 1934 are due; and it is hoped that the new year will witness a further increase in the membership. The annual subscription is 2/6, and any number of years' dues may be paid in advance. Payment may be made by postal-notes or by I.d. postage stamps, and correspondence should be addressed to the secretary, Mr. Wm. H. King, Room 106, G.P.O. Buildings, Wellington, C1. N.Z. club members may, however, pay NZEA subscriptions to their respective club secretaries.

Greetings.

The NZEA Executive extends to all Dominion and Australian Esperantists the compliments of the season, and trusts that a Merry Christmas and a Happy New Year will be followed by good health and prosperity for all.

—W.H.K.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Melbourne Esperanto Club (sales), 9/8, (subs.), 8/-; Mrs. Tondut, 4/6, June, '34; Mr. Towsey, 4/6, Oct., '34; Brisbane Esperanto Society (sales), 12/-; Miss Krass, 4/6, July, '34; Miss Trundle, 5/-, Dec., '34; Mr. McDonald, 4/6, March, '35; Mr. N. G. Mills, 4/6, Aug., '34; Mr. Logan, 4/6, Sept., '34; Mr. G. W. Card, 4/6, Nov., '34; Mr. J. Elhot (4 copies each issue), 18/-, Jan., '35.

SERIOZE KAJ SERCE.

La mondo estas komedio por tiuj, kiuj pensas; ĝi estas tragedio por tiuj, kiuj sentas. Horace Walpole (1717-1797).

La malbonoj de deviga nelaborado estas preskaŭ tiel venevaj kiel tiuj de deviga laborservo. D-ro L. P. Jacks.

Knabo: Mi vizitas vin, onklo, por diri al vi la bondezirojn de mia naskdatreveno, kiu okazis hieraŭ.

Domluemulo: Tiuj ĉambretoj ne taŭgas—ne sufiĉas en ili spaco por svingi katon.

Domestrino: Pardonu! Sed mi ne permesus doriĵotajn bestojn ĉi tie.

Komizo: Ĉar mi baldaŭ edziĝos, mi petus vin konsideri plialtigon de mia salajro.

Kompaniĉefo: For de ĉi tie! Se ne, ni igos vin kompaniano, en kiu okazo vi ricevos nenion.

Aŭtobrokantisto: Kio do misfunkcias ĉe via aŭto aĉetita el ni lastan semajnon?

Viktimo: Ĉio krom la sireno blekas bruadon!

Unuino: Mia amanto estas spicisto; li multe helpas min konsile pli al ajoprezoj.

Dua: Mia estas tramisto; li konstante diras al mi: Bonvole sidigu pli apuden.

Li legas verkojn de poetoj per la sendolora metodo:

Poeto: Mi supozas, ke vi volas mian aŭtografon, ĉar mi estas fama poeto?

Pop: Ho ne, Mi volas ĝin, por ke mi povu diri, ke mi legis almenaŭ iomete el viaj skriboj.

Tu viro, ĉikanita de la edzino dum la tuta vivo, fine liberigis en la morton. Certa amiko lia, spiritisto, kontaktiĝis kun li. Sekvis la jena dialogo inter la du mondoj:

La Terano: Kiel vi fartas, kie vi lokas?

La Alia: Nu, iu ulo, tre similanta la Satanon, penas min konvinki, ke mi estas en la Infero!

Kio kaŭzas, ke la tagoj estas en somero longaj kaj en vintro mallongaj?

Ĉar la varmo vastigas kaj la malvarmo malvastigas!

Hieraŭ mi veturis per fervojo, kaj en la vagono, angla kunveturanto metis dormanta la piedojn sur miajn genuojn. Nu, kial vi ne vekis lin?

Mi ne povis, ĉar mi ne scias paroli angle.

Vagulo trovas sur la vojo eluzitan dentobrosan. Li ĝin levas kaj mirigite rigardas, diranta al sia kolego: Kio povas esti tiu strangaĵo?

Verŝajne ia luksa sinamuzilo, kiun eltrovis la superklaso.

Vojaĝi plenespere estas pli bona ol alveni, kaj la vera sukceso estas laboro.—R. L. Stevenson.

Ne konfidu viajn ĝenojn al aliaj: ili nur serĉas okazon rakonti la siajn al vi.—George Eliot.

Estas pli bone iĝi viktimo de tempo al tempo, ol travivi la mondon kun suspektema menso.

Plaĉo Penrista.

En societo de artistoj oni parolis pri literaturo. Iu laŭdis Sagoan de Forsyttojn.

Tiu Galsworthy, tio estis genio! Tiu ne imponas al mi, rimarkigis seke unu el la penristoj, min ĉarmis precipe la figuro de Soames Forsyte, ne la aŭtoro.

Kial Soames tiom plaĉis al vi? Nu, pro tio, ke li pasie aĉetis pentraĵojn.

(La Progreso, Praha.)

Instruistino: "Tomĉjo, kio estis la Meduso?"

Tomĉjo: "Ĝi estis io, kio similis al virino—sed pli terura."

Ĉe la fino de unu el siaj lastatempaj libroj elstaranta angla verkisto rimarkas:

"Estas entuziasmoj, kiuj laŭte bruas pri internacia lingvo. Internacia natura saĝo estus pli trafa."

Internacia natura saĝo! Tuktore ni konsentas, sed, laŭ nia humila opinio, la unua logika paŝo tiudirekten estas la akceptado de internacia lingvo.

Malgranda knabino rigardis faskaptilojn entiri reton plenan de fiŝoj. Subite ŝi kriis:

"Kiel ili ĝojas pri la kaptigado! Rigardu kiel ili ĉiuj ŝvingas la vostojn."

Intensa junulino al aviadisto—"Diru al mi, kiel sonas la kanto de alaŭdo, kiam vi ankaŭ estas inter la nuboj?"

Tiu ĉi estas la leĝo de bona ago inter du: tiu, kiu faras, forgesu, ke ĝi iam estis farita; la alia neniam forgesu, ke ĝi estis ricevita.—Seneca.

Pensoj de J. Ruskin.

Cia agreto, eĉ la skribo de linio aŭ la elidiro de silabo, estas kapabla de aparta digneo en sia farmaniero.

Vera pentristo faras eĉ la kolorneeston bela, samkiel la iom post ioma formortado de perfekta voĉo faras la silenton sankta.

Ĉiuj veraj opinioj estas vivaj kaj montras sian vivon per nutrigpovo kaj tial per ŝangeblo. Sed ilia ŝanĝado estas tiu de arbo, ne de nubo.

La naturreĝo estas, ke difinita kvanto da laboro estas necesa por produkti difinitan kvanton da kia ajn bono: tial, se vi deziras scion vi devas laboregi por akiri ĝin.

Ĉiu bona ago kaj pura penso signas sian belecon sur la vizaĝo kaj korpo—Ĉiu malbona ago kaj malvirta penso sian sigelon distordigas.

La trezorejo de veraj reĝoj estas la stratoj de siaj urboj.

Faru severaj viajn edukleĝojn, kaj tiam viaj kriminalaj leĝoj povas esti indulgaj. Sed se vi permesos troan liberecon al la junularo, tiam vi devos konstrui malliberejojn por la maljunularo.

Neniam instru al infano ion, pri kio vi mem ne estas certa.

Je via propra volo vi povas vidi en la defluso de la strato, aŭ la rubon de la strato, aŭ la bildon de l'ciele.

La promesoj faritaj en tempo de aflikto bezonas pli bonajn memorojn ol la homoj kutime posedas.

Vi faros la plej grandan servon al la regno se vi konstruos, ne la tegmentojn de la domoj, sed la animojn de la civitanoj; ĉar estas pli bone, ke grandaj animoj loĝu en malgrandaj domoj, ol malnobelaj sklavoj en domegoj.—Epictetus.

MI MEMORAS!

Mi tre ĝojis kiam mi legis pri la Brisbana Esperanto-Societo, ĉar ĝi vekis en mi memoraĵojn pri la tempo pasinta.

Mia frato, J. G. Pyke, ĉiam amis gastiĝi siajn esperantajn ĝemakojn. Unu vesperon estis eĉ nia hejmo juna fraŭlo, kiu parolis esperante tre lerte. Li loĝis en la kamparo, kie ne estis aliaj esperantistoj. Mi diris al li, "Kiel vi parolas tiel bone?" Li respondis, "Ho, mi parolas al mi mem."

Ofte mi pensis pri tiu respondo, kaj konsideris kiel efika estis tiu parolado "al mi mem," kaj vidis image tiun junan fraŭlon sub la blua ĉielo, kun la verda herbo malsupra, dum li laboris kaj parolis esperante, nur la bestoj kaj la birdoj kiel aŭskultantoj.

Tiu junulo estis s-ro N. G. Mills. Mi vidis pri la sendaĵo el Brisbano ke ankoraŭ li laboras por Esperanto, kaj lia juna filo ĝuigis la piknikan grupon de ĝeesperantistoj, kiam li deklamis "Fajrobriĝadano, savu mian infanon."

Mi esperas ke la juna filo povas paroli tiel lerte kiel lia patro, kiu perfektigis kiam li parolis "al si mem," en la bela kamparo.—EMMA PYKE.

POR LA VIRINOJ.

Nur antaŭ du tagoj virino en unu el la montaj vilaĝoj senkolere trapikis sian edzon per grandega tranĉilo. Ŝi ofendiĝis ke li batis ŝin. Nu, neapolitaj virinoj fieras pri tiu ĉi servado de siaj edzoj pripransante ĝin kiel pruvado de amo—kiam mi urĝis ĉi tiun vidpunkton al la saĝuloj de la vilaĝo, ili senkulpigis ŝi pro la fakto, ke ŝi ne estas neapolitano, kaj ne pli bone sciis.—Norman Douglas en la "Woman's Mirror."

'La virinoj de mia epoko povis fari ion. Mi antaŭe vidis sinjorinon vestita de kapo al piedo en ŝiaj propraj fabrikoj; sed nuntempe restas ne eĉ unu afero de ŝia propra fabrikado al ilikrom iliaj vizaĝoj.' Tiel skribas Oliver Goldsmith (1728-1774) en "The Good-humoured Man." Legante tiun oni miras, eĉ la sama bastono ĉiam taŭgos por ĉi la virinojn tra la estonteco.

NEWS CLIPPINGS FROM ESPERANTO GAZETTES.

The novel "Hura," written in Esperanto by J. Baghy, a Hungarian, has appeared in a German translation by Albert Mair, Innsbruck. Translations

in other languages are in preparation. ("Hungara Heroldo.")

"Mr. Tot aĉetas mil okulojn," the Esperanto novel by the Pole Jan Fettek (Jean Forge), has been put into German and Polish. The lastnamed appeared recently and was well received, while the German translation reached several editions. ("Literatura Mondo.")

"INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO"

has appeared regularly now for ten years. It reports faithfully the work of international scientific pedagogy, the congresses and labors of international teaching assocs. and the progress of Esperanto among the schools and the teaching profession. It also acts as the medium for correspondence between teachers and pupils throughout the world, being the organ of the Tutmondna Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE). Sub. for 6 copies, inc. membership of TAGE, 2.50 Dutch guilders. Send sub. and articles to P. Kort, Schoolstraat 13, Veendam, Holland.

LA AŬSTRALIA LANDIDO.

Kredeble, kiel kredas multaj, la indigenoj de Aŭstralio havas tre malaltan vivnivelon, sed malgraŭ tio, ilia riĉeco prave ŝajnas al ili esti granda. Loĝante plejparte apud maroj kaj havante la loĝejoj proksime de arboj, ili havas manĝaĵojn el kiel marĉoj kaj arbaroj samtempe — el la marĉoj karikon (kollektitan de la inoj), angilojn (lanepikatajn de la viroj), anasojn (aŭ ŝtonmortigitajn aŭ kaptitajn per gluaĵo ŝmirita sur la ĉirkaŭajn arbojn), kaj alispecajn akvobirdojn; el la arbaroj ili havigas al si makropojn, serpentojn, larvojn, didelfojn k.t.p. La arbaroj liveras ankaŭ belajn peltajn (kiel makropajn), kiuj vintre uzigas kiel molaj fleksiblaĵoj kovriloj. La peltajn, kiujn ili moligas per multa frotado, la virinoj kukurdas per bestaj tendenoj kiel fadenoj, kaj per osteto el posta kruro de makropo, kiel kudriloj. Se ili ne deziras alkuŝiĝi frue, ili ne uzas tuj la peltkovrilojn, sed ekruliginte du malgrandajn fajrojn, ili sidas inter tiuj, por ke ankaŭ la dorso fariĝu varma.

Kiel valizon la enlandano uzas lignan trogeton porte sur la kapo aŭ pende trans la kokson. En tiujn ili enmetas jen manĝaĵojn, jen eĉ la infaneton. Alia speco de portilo estas la sako tekstita per junkoj. Ĉi lasta tenas, inter aliaj objektoj ankaŭ la penatojn (1) t.e., diversaj aĵoj por maltrafiĝi malbonajn spiritojn.

Niaj "infanoj de la naturo" ne povas ion boligi, ĉar ili ne konas la arton potfaradan; sed iliajn rostitajn fiŝojn, viandon kaj radikojn multaj ja ne malestimus. Por rosti ili enterigas en la daŭro de nokto la kuiritajn en elfosaĵo trege varmegita. Ion strangan guston helpas doni la junkoj, per kiuj ili ĉirkaŭas la kuirpecojn.

Multe multe estas la ruĝoj de la landidoj, por fari la vivon agrabla; sed eble Esperantisto preferus legi ion pri iliaj lingvoj. Ĉi tiuj estas ja multaj kaj lerneblaj nur per praktiko. Ĉi tiu elĉepo el la Patro-nia en la dialekto de la Arandaj indiĝenoj eble intereso:

"Kara nunakara alkiala, Retna unkwanga atknaltareikeana.

"Tmaratujia unkwanga pitjekiana, Antjabna untkwangana alberkuekana alkiala ngera, lakina alala tuta . . ."

Sed pro kio mi daŭrigu ĝin?

—C. C. COWLING.

(1) Boirac. Ĝusta-uzo, la vorto signifas "hejmajn diojn de l' antikvaj Romianoj).

KRONIKO.

Wellington, Nov-Zelando.—De post rekomencigo, je la mezo de februaro, la loka klubo kunvenis seninterrompe ĉiunmartes, kaj la klubano, nombrante inter 20 kaj 30 ĝuis bonegajn programojn ĉiusemajne. Pro la sukceso de la kunvenoj la agemaj kluboficistoj meritas laŭdon, ĉar per ilia sindonema laboro dum longa tempo Esperanto tre fortigis en la Nov-Zelanda ĉefurbo.

La ĉiusemajnaj programoj klubaj estas senescepte edukaj, amuzaj kaj distraj. En la kluboj, varmigita per elektro, la arango estas provizi laŭbezone diversgradajn lecionojn dum unu horo (post konfirmo de la protokolo antaŭsemajna), ankaŭ parolpraktikado samtempe por diversgrade spertaj samideanoj. Post tio sekvas variaj programeroj en Esperanto: komedioj, deklamoj, paroladoj, kaj en la pasintaj tri monatoj, kunkantado kaj muzikaj eroj. Kutime, unu el la kluboficistoj anoncas pri grava progreso aŭ fakto rilate al aŭ Esperanto aŭ la movado, kaj la detaloj estas raportitaj en la klubraportoj, kiuj nepre aperas en la tagĵurnaloj post la kunveno.

La klubo ĵarfine agos ĝel gastiganto de la 5a N.Z. kongreso; tiam ni esperas bonvenigi multajn novajn kaj malnov-

ajn amikojn, kaj ankaŭ pogrande disvastigi Esperanton.

KORGRATULON

al f-ino L. Corkill, Christchurch, Nov-Zelando sukcesite je la B.E.A. supera ekzameno. Jen pruvo de altgrada scio de Esperanto. Tre agema por la movado, tiu nov-Diplomito estas N.Z.E.A.-ano de post starigo de la asocio en 1929.

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(N-ro 9)

"La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukita, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro . . . Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesis min ĉiam pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzercigadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere parolas nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane), la lingvon francaan mi legas libere sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis ion ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj ŝtuf teorie . . . Car la pli granda parto de mia popolo ne uzas la lokajn lingvojn, sed parolas per aparta 'jargon' hebrea-germana (la tiel nomata 'yiddisch'), kiu ĝis nun ankoraŭ posedas nenian gramatikon, tial mi antaŭ longatempem dedicas ĉirkaŭ du jarojn al la fundamenta esplorado de tiu jargon, mi esploris ĉiujn ĝiajn legojn kaj mi ellaboris ĝian gramatikon. (kiun mi tamen neniam publikigis). El privata letero al s-ro Michaux, 21 Februaro, 1905. Citita en Lit. Mondo (Sept, 1933) de prof. Waringhien, kiu promesis presigi la tutan skribon por ĝia escepta graveco.

Coburg Esperanto Club: Jarkunveno Nov. 2, ĉe kiu s-ro E. Hearne elektigis prez-o: s-ro A. Spencer sek-cio (denove); s-ro J. Aldreth helpsek.; s-ro S. Ling gazetkoresp. Aĵoj arde deziras plisolidigi la klubon kaj tiucele decidis fondi konversacian rondon, kiu kunvenos ĉiunmarte p.t. ĉe la Koburga Lago por parolekzerco. Komitato ankaŭ fondigis, por aranĝi amuzestojn post lecionojn je la 9.30 vesp. Debatoj, E. anarkantado, dancoj, ludoj, trovos lokon sur baldaŭaj programoj.

RECENZOJ.

Mi en Li.—Ladislav Vladyka. El la ĉefa tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Olomouc. 194 pĝ. Prezo 48. 6p.

Ĉi libro plaĉas al legantoj de la fantaziaj romanoj de H. G. Wells, plus lerte ententigaj vortoj de erotismo. Ĝi komencas per misteraj okazoj en mortintoj kaj finiĝas per sensacia sceno en krimalluĝejo. Sed inter la unua paĝo kaj la lasta ni trovas maron da komplikco, aludoj, vualitaj movoj kaj konjektigoj, kio povas tro fidi la paciencon de legantoj, el kiuj la pli-multaj devos sidi en konstanta nebulo, cerbumante la direktagadon de la aŭtoro vagiro. Ne tiu E-isto povas diveni aliajn pensojn, aŭ emas ordaltigite interpretitajn bagatelojn tute necesejan por la rakonto. Tio validas ekzemple por la paĝoj pri kabaredo Colorado, vortŝaŭma pri-skrubo per kiu Vladyka, cetero kun la rajto, denuncas la falsecon kaj mallebemon de l' grandurbaj plezurorgioj, nudadancoj, negra blekmuziko k.s.

Ni vidis jam multajn filmojn, vaste reklamitajn sed tre malpli pensenhavajn kaj interesajn ol tiu ĉi verko. En la manoj de kompetenta scenariofaristo, kiu kribrus, pliniegis la dialogon, kaj plivigis la agadon entute, "Mi en Li" povus bonfari sur la kina kampo. Jean Forge eble notos? Sed la libron ni ne rekomendas al homoj kun (denaske) lacaj cerboj.

Malgraŭ fakto, ke londonanoj, berlinoj kaj ĉeĥoj kontrolis la tradukaĵon de la Pionira kolekto, ni devis halti ĉe kelkaj lokoj en la teksto, kiujn ni ne povas trakti por spacmanko. Ni demandas nur: Kio signifas "viktimo de periferio"?

La Mono de Sinjoro Arne.—Selma Lagerlof. El la sveda tradukita de Stellan Engholm. Eldonis Forlagsforeningen Esperanto u.p.a. Prezo 1.50 kr. Pĝ. 110.

Verketo de la fama svedino, Nobel-premito: Puŝate de monavido dung-soldatoj murdas pastron kaj lian familion, krom unu knabino. De tiu temas pri la Dia juĝo, kiu venas sur la krimintojn pere de la fantomo de juna murdinto. Naŭva rakonteto, eble verkita por la simplaj svedaj fiŝistoj, kies tipo, Torarin, ludas ian rolon en ĝiaj paĝoj. Ni rememoras, ke Tolstoj faris similan par la rusaj kamparanoj.

Povas esti, ke ĉi dua verko de Lagerlof estas pli "tipa" por ŝia plumo ol "La Junulino el Stormyr", sed ĝi ne estas tiel interesa. Ke la rakonto estas scenigita en la 16a ĵarmcento ne meritas menciion: tiu tempo medio aldonas nenion da signifo aŭ pitoresko. Tute egale la agado povis okazi en ajna historia periodo.

Eble ja vere, ke iaj pli-malpli sciindaj psikologaj instruoj subkuŝas la suprajn de ĉi tiu facile legata libreto, sed la meza E-isto, ne estante stude-

mulo, ne penos elfosi por si tiajn malevidentaĵojn. Dum ke ni ne havas en E-o verkojn de Lagerlof pli gravajn, do konformajn al sia eksterduba grandtalento, ne multe efikas paradi ŝian nomon en la librolisto.

Traduko bona: sed "bordmagazeno"? (magazeno—ĉionvendejo): 12, "ĉu mi ne aŭdas kiel (oni, aŭ iuj) fajlas"; 18, "li havis vundon sur la kapo kaj li estis plena de sango" (kovrita de s.); 20, "li (tiel) vipis la ĉevalon, ke ĝi stampis"; 68, "doni lokon al pento" (Kp.: Romanojn 12/19, "cedu lokon al kolero"; ni dubas pri ĝusteco de la Engholm'a tradukero).

Konsilioj—Sugestoj de Malnova Esperantisto.—Andres Pinos. Str. Colon 24, Valencia, Hisp. 56 pĝ, prezo ne montrita.

Komparante le postmilitan generacion de E-istoj kun la viglaj infanoj de la frua tempo, la aŭtoro vivpote kritikas la unuan kategorion. "Ĉio nun estas maldordo; entuziasmo jam perdis; kie estas la malavaraĵ kaj nesuspektindaj E-istoj de la praavaj [!] tempoj?" Li metas liston de decidoj aŭ iniciatoj favoraj al E-o, en diversaj ĵaroj prenita de gravaj institucioj, kaj demandas, kiom efektive ili valoris? Laŭte trumpetitaĵoj kiel grandaj triumfoj en sia tempo, ili nun staras malviva litero aŭ prezentas terenon pene tenatan nur per laborado de fervoraj izoloj. Ĝa tro vere: sed ni ĉion, pensu pri lia unua punkto.

Jus leginte "Analizoj Historien de la Esperanto Movado" (Drezen), en kiu (pĝ 16-26) la ruso pritraktas, kion li kredas esti interluktado de ambiciloj aŭvidaj transidi en la Esperantojo de la fruaj ĵaroj de l' nuna jarcento, ni sentas deziron renkontigi s-rojn Pinos kaj Drezen, por ke ili harmoniigu siajn malsamajn kredojn koncerne la motivojn, kiujn pri la tiamajn ĉefrolulojn.

Akuzante pri nuntempa neardeco Pinos nur parte pravas. Ni vivas en epoko skuanta. Krizo, revolucio. Sub batoj ĉiutaga la kapoj svene kirliĝas. Sed spite tion E. eldonejo (Koln, Budapest) kun apostola fido eliras gazetojn, librojn, sen multa kunko. Historio nepre nomos, inter aliaj, Bleir kaj Jung hereditivo de tiu antaŭen-ema spirito, kiuj movis Bourlet kaj Cart.

S-ro Pinos sciu, ke okazis ankaŭ ŝtormaj disputoj inter la Parizaj gigantoj; la nunaj centro-eŭropanoj ne tion monopolis. Sed inter homoj forte fervoraj facile flamiĝas malkonsentoj pri ĝusteco de tiu aŭ tiu gvidlinio.

La aŭtoro ankaŭ pozitive kritikas. Li donas atentindajn sugestojn, laŭ kiuj la ĉefaj E. organoj raciigite limigu sin je siaj respektivaj ĉefecoj: Literatura Mondo (literaturo), La Praktiko (instruo), Heroldo (novaĵo, ĝenerala formo), kaj Esperanto (pure oficiala organo de la centra direktivo).

Stimula broŝuro, kun strangaj preskaj plumeraroj.

NOVAJ GAZETOJ.

La Kritika Observanto; Revuo politika kaj Kultura. Kvaronjare. 6 Sentoj de la Sablonniere, Malakoff, Seine, Francujo.

Laboristidendenca. Studinda artikolo pri la faktoroj, kiuj venigis la ŝtatpotencon al Hitler. La aŭtoro analizas faŝismon kiel energiegan provon de la konvulsianta kapitalismo konservi ĝian sistemon. Prezo por 4 n-roj, 1 sil.

Esperanto dia Wszyskich: Nova pola gaz., ĵurnalforma. Pleje pollingva. Ŝajnas eĉka propaganda ilo.

(ROBO)

DUM AŬSTRALIO ESPLORADO.

En 1923 Michael Terry, juna anglo, transiris Nord-Aŭstralion per aŭtomobilo. Tiu ĉi parto de la lando konsistas el vastaj, malplenaj regionoj, kies amplekso estas pli ol kvar fojoj tiu de Granda Britujo, kaj kie la ĉefaj loĝantoj estas indiĝenoj.

Ekzistas tie malmultaj izolitaj loĝoj aŭ brutarbienoj de grandega amplekso, kie la blankuloj loĝas duope kaj triope. Ekzistas nek bariloj, nek vojoj, nek telegrafo. Estas eble veturi dum multaj semajnoj kaj ne vidi homan loĝejon aŭ renkonti personon. La pioniro povus morti pro soifo aŭ lacego en tiu senlima sovaĝejo, kaj lia korpo neniam estus trovita.

Sekvas okazaĵo dum tiu aventurama vojaĝo de Michael Terry kaj lia kunulo, de Winton, en Kvinslando, ĝis Broome, en Okcidenta Aŭstralio, inter la 6a februaro kaj la 4a oktobro 1923.

"Ĉe Wave Hill, Terry povis havigi pli da petrolo, tiel evitante la prokraston se li sendus al la marbordo (200 mejlojn) por ĝi. Estis la tuta kvanto, kiun posedis la petrolostacio, sed, aŭdinte ke la ekspedicio penas veturi trans Aŭstralio, la kontrolistoj donis ĝin malavare por ke ili ne estu prokrastigitaj. La aŭto estis kontrolita antaŭ ol foriri, kaj ili trovis, ke ĉio estas en bona ordo.

La distanco al la proksima brutbieno estis centridek mejloj, kaj pro tio ke ili ricevis bonajn gvidinstrukciojn de la viroj ĉe Victoria River, ĝi devus esti sufiĉe facila veturo. Sed baldaŭ post la ekiro Terry vidis la por si unuan fajregon inter la seka herbo, kaj sciis, ke li estas vizaĝon kontraŭ vizaĝo kun la plej grava danĝero el ĉiuj. La fajro estis for, kelke da distanco, sed herbfajregoj kuras rapide kaj ŝanĝos sian direkton kun ĉiu nova vento. Tial ili ĝuis tre mallongan dormon tiunokte.

Je la komenco de la proksimtaga vojaĝo densaj nigraj fumnuĝoj kolektiĝis ĵus antaŭe. Dum la veturantoj alproksimiĝis ili povis vidi la flamojn, kiuj altigis ĝis kvin metroj de la tero. Kaj la fajro etendiĝis de unu flanko de la horizonto ĝis la alia, kien ajn oni rigardis.

Ne estis eble evitpasi ĝin. Oni povus nur reveni tiel eble plej rapide aŭ traveturi ĝin.

Iri returnen ĝis ili atingos nudan teron aŭ akvon malŝparus valoron petrolon. Kaj ili ne havis petrolon por malŝpari. Tial ili decidis elekti la riskigan planon per trakturi ĝin.

Kun malsekaj tukoj super siaj buŝoj, ili ekveturis al la fajrego kiel eble plej rapide. La tero estis malebena kaj ili povus nur penegi sin teni en la aŭto, dum la petrolo kiu elapruis el la karburilo pliiĝis la riskon, ke la aŭto ekbrulus.

Bonŝance, ili trovis breĉon sur la ŝtona tero inter la herbo, kaj trans tiun ĉi breĉon rapidegis la aŭto. La bruliga spiro de la fajro levis iliajn vizaĝojn, la fumo dolorigis iliajn okulojn. Estis angora momento. Dum ŝajne horoj ili envolvigis en flampena fumo. Efektive nur estis momento aŭ du antaŭ ol ili atingis teron jam forbruligitan... kaj tial sendangeran.

Estis granda risko. Tre bonŝance ili eskapis kun nenio pli ĝena ol iomete da difekto al siaj provizaĵoj—la sukero intermiksiĝis kun la teo, kaj la faruno surŝpruciĝis sur ĉion dum tiu ekkuro por la vivo. Tiun posttagmezon la aventuristoj atingis Invermay Bionon sendangere."

RESULT OF PYKE

MEMORIAL EXAMINATION.

Winner of the Special Prize: Dr. Isabella Phillips.

Runner-up: Miss Gertie Morris.

Competitors for Certificates only:

Mr. H. M. Lanyon and Mr. S. Ling passed with honors.

Mr. F. S. Chamberlain, Mr. F. Clifton, Mr. A. Gleeson, and Miss M. McKay passed.

Holger Danske.

In Denmark there stands an old castle, which is called Kronburg: it stands by the sea, where the large vessels pass daily by hundreds, English as well as Russian and Prussian, and they salute the old castle with cannon that say 'Boom!' and the old castle answers with cannon: 'Boom!' for that is the way the cannon say 'Good day!' 'Many thanks!' In winter no vessels sail past there, for it is all ice, right across to the Swedish coast; but it is like a regular road, where the Danish and Swedish flags are displayed, and the Danish and Swedish people say to each other: 'Good day!' 'Many thanks!' not with cannon, however, but with a friendly shake of the hand; and they buy cakes and biscuits from each other, fancying they taste better than their own. But the most remarkable of all is old Kronburg, and beneath it, in a deep, dark cellar, which no one ever enters, sits Holger Danske. He is clad in iron and steel, and rests his head on his strong hands, whilst his long beard hangs down upon the marble table, into which it has grown fast. He sleeps and dreams, but in his dreams he sees all that goes on in Denmark. Every Christmas Eve an angel comes down from Heaven and tells him that all he has been dreaming is perfectly correct, so that he may go to sleep again in peace, as Denmark is in no actual danger. But should it be in danger, then old Holger Danske will arise, breaking the table as he draws out his beard, and he will lay about him with his sword so that it shall be heard in all parts of the world.

Dano Holger.

En Danujo staras antikva kastelo, kiun nomigas Kronburg: ĝi staras apud la maro, kie tage pasas pocente la grandaj ŝipoj, anglaĵ kaj ankaŭ rusaj kaj prusaj, kaj ili salutas la antikvan kastelon per kanonoj, kiuj diras 'Bum-um!' kaj la antikva kastelo respondas per kanonaj bu-umoj, ĉar tiamaniere la kanonoj diras, 'Bonan tagon!' 'Multajn dankojn!' En la vintro neniam ŝipoj preterpasis tie, ĉar estas ĉioma glacia tute transe ĝis la sveda marbordo. Sed ĝi similas surpaŝitan vojon, kie elmontrigas la danaj kaj svedaj standardoj, kaj la danaj kaj svedoj diras unu la alian, 'Bonan tagon!' 'Multajn dankojn!'; ne per kanonoj tamen, sed per amika mana interpreno: kaj ili aĉetas kuk-ojn kaj biskvitojn de unu la alia, imagante, ke ili pli bongustos ol siaj propraj. Sed la plej rimarkinda el ĉiuj estas antikva Kronburg, kaj, sub ĝi, en profunda malluma kelo, kiun neniu ajn eniras, sidas Dano Holger. Li vestigas per fero kaj ŝtalo, kaj ripozigas sian kapon sur la fortaj manoj, dum lia longa barbo surpendas sur la marmoran tablon en kiun ĝi firme kreskas. Li dormas kaj songas, sed en siaj songoj li vidas ĉion, kio okazas en Danujo. Ĉiu antaŭkristnaska vespero, anĝelo malsupreniras el la ĉielo kaj diras al li, ke ĉio, kion li prisongas estas realbaza. Tial li povas denove pace dormi, ĉar Danujo ne tuŝas vera danĝero. Sed se iam ajn alproksimiĝos danĝero, tiam maljuna Dano Holger levigos, rompante la tablon kiam li eltiras sian barbon, kaj li ĉirkaŭfrapos per sia glavo, tiel ke ĝi aŭdiĝos en ĉiuj partoj de la mondo.

Melbourne Esperanto Club.—Meets every Wednesday, 8 p.m., in Australasian Church Hall, Russell Street, Melbourne. Tuition, classes, conversation, etc. Secretary, Mr. R. Rawson, 169 Exhibition Street, Melbourne.

Westralian Esperanto Society, Perth. W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

Masterton (N.Z.) Esperanto Club.—Meets Tuesdays at 8 p.m. in Y.M.C.A. Patrons: The Y.M.C.A. board of directors; Hon. Pres., G. R. Sykes, Esq., M.P.; Pres., Mr. A. Dewar, D.B.E.A.; Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A. Address: 38 Workson-rd., Masterton. Visitors welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram

Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. V. Leck; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.

Melburna Esperanto-Societo. Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretario, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18h.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun laŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro V. Rutland; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto-Societo kunvenas la 2an kaj 4an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-st.: proksime de konstruo "State Insurance." Prez. kaj sek. provizoro: s-ro Leon. Parry. Vizitvortoj: s-roj O. Behnken (del. U.E.A.) kaj M. Hyde: Bibliotekisto: f-ino E. B. Carrick, Office Supt. Teleg., Brisbane, Queensland.

Coburg Esperanto-Grupo.—Kunvenas ĉiujade je la 8a vespere ĉe la Labour Hall, Sheffield-st., Coburg (malantaŭ

Grand Teatro). Prezidanto, s-ro Hearn; sek., A. W. Spencer, 48 Munro-st., Coburg. Vizitantoj ĉiam bonvenigitaj.

KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred. J. Williams, Samaria, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

Adelaide Esperanto Club: Sud-Aŭstralio. Kunvenas ĉiujade je 7.45 horo vespere ĉe Paringa Bldgs., Hindley-str., Adelaide. Prez-o: S-ro W. L. Waterman, Roebuck-str., Mile End; Sek-o: S-ro F. L. Droop, 13 Chatsworth Grove, Toorak Gardens.

For Your Bookshelf.

"Interrompita Kanto." Orzeszko 1/3.

A large selection of literature, text books, dictionaries, stationery, badges.

Melbourne Esperanto Society, Box 731F, P.O., Melbourne.